entute rajtas tiel decidi pri la sorto de milionoj da aliaj kunvivantaj organismoj, kun kiuj li havas tiom da simileco laŭ genetika vidpunkto). Tiurilate estas ĝojige ke la Konvencio pri Biodiverseco agnoskas la "intrinsikajn valorojn" de la naturo - t.e. la valoroj en si mem, la ekzistorajto de la naturo. Certe granda progreso estas atingita kompare al la tempo ne tro longe for, kiam la batalo kontraŭ la naturo estis kvazaŭ ĉefa okupo de la homo.

Fine, interesa komparo estas tiu inter biologia kaj kultura diversecoj. Same kiel biologia diverseco gravas ankaŭ por la pluekzistado de ekosistemoj kaj la pluvivo de multaj plantoj kaj bestoj, la kultura diverseco povas esti konsiderata kiel garantio kontraŭ malbona evoluo de la socio. Tiurilate la altrudo de nur unu "civilizo", kiu karakteriziĝas per merkatekonomio kaj senlima fido je teĥnika solvo de problemoj, neeviteble kreos proprajn surprizojn, agrablajn aŭ malagrablajn, depende de la vidpunkto.

**Adreso de la aŭtoro**

*Lic. Bert DE WIT*
*Houtvaartkade 21*
*NL 2111 BR Aerdenhout*
NEDERLANDO
Retpoŝte per laborejo: rmno@xs4all.nl

**Priaŭtora informo**

D-ro *DE WIT* estas kunlaboranto de la Nederlanda Konsilantaro pri Medio- kaj Naturesplorado, kiu konsilas al la Nederlanda registaro pri la sciencaj esploroj en tiu kampo farendaj por produkti kaj kombini sciojn taŭgajn por solvi sociajn problemojn.

**Glosaro**

**intrinsika** - rilata al la ekzisto mem;
**intrinsika valoro** - valoro mem pro la ekzisto de planto aŭ besto;
**redundanco** - ŝajna superfluo en naturaj substancoj (i.a. DNA) aŭ organismoj (genotipoj kaj specioj, kiuj ŝajne okupas saman niĉon) aŭ ekosistemoj (kiuj havas funkcion laŭ evolua vidpunkto)



*Scienca Revuo Vol. 51 (2000) (2)*

# Bubalomaskoj de la Bvao (*Bwa*)* en Burkino

*H. WELLHÖFER & R. SACHS*

**Enkonduko**

La Bva-tribo*, popolo konsistanta el proksimume tricent mil homoj, vivas en la okcidenta parto de Burkinofaso (aŭ 'Burkino', la iama Supravoltio) en Okcidenta Afriko, parte ankaŭ transe de la landlimo en Malio. La centro de iliaj loĝejoj troviĝas en la arko de la rivero "Nigra Volto". La Bvaanoj ne estas organizitaj kadre de afrika reĝlando sed vivas sendepende en dense loĝataj vilaĝoj ĉirkaŭataj per teraj remparoj por pli bona defendo. Ili kulturas precipe milion kaj estas famaj pro sia kulta maskodancado.

Ĉe la Bvaanoj la maskoj estas farataj pere de lignoskulptistoj. Tiu metia kasto (ĝenerale viro kun siaj edzinoj, kiuj produktas potaĵojn) formas unu el tri kastoj: apud ĝi la farmistoj kaj la muzikistoj. Inter la diversspecaj Bvaaj maskotipoj troviĝas la plej famaj, pli ol du metrojn longaj bret- aŭ tabulomaskoj. Ankaŭ la tribospecifaj bubalomaskoj de la Bvao estas bone konataj.

En la kolekto de Afrikaj maskoj, nuntempe troviĝanta en la Esperanto-kasteleto en Tavoleto (Italujo) estas kvar rimarkindaj bubalomaskoj, kolektitaj de unu de la aŭtoroj (*R.S.*) dum profesia laborperiodo en *Bobo-Dioulasso*, ĉefurbo de suda Burkino. En tiaj bubalomaskoj efektiviĝas la supernaturaj fortoj de la proksima arbustejo. Kvankam figurante bubalojn, la maskoj ne intencas prezenti tiun bestospecion, sed en ili rezidas supernaturaj fortoj, kiuj pere de dancado aktiviĝas por la vilaĝo respektive por la klano.

Tiu ensemblo de kvar maskoj el la sama tipogrupo estas vera bonŝanco, ĉar el konformeco kaj ŝanĝoj de masko al masko estas ekkoneblaj certa laŭleĝeco kaj stilaj rekoniloj, kiuj estas kvazaŭ atestaĵo pri intenco kaj laŭforma decido de la koncerna lignoskulptisto.

* *Bwa* = okcidentafrika tribo: kolonilingva skribmaniero *"Bwa"*, indiĝena prononce inter "Bva" kaj "Bŭa". En la teksto estas uzata "Bvao" por la tribo, Bvaano(j) aŭ Bvaulo(j) por triba(j) membro(j)





**Masko n-ro 1**
grando: 87 x 61 cm
fulgopatina kovraĵo
surkorne po unu "okulo"
*Bobo-Dioulasso* / Burkino
kolektojaro 1977





**Masko n-ro 2**
grando: 65 x 42 cm
fulgopatina kovraĵo
surkorna okulo kaj stelo
*Bobo-Dioulasso* / Burkino
kolektojaro 1977







**Masko n-ro 3**
grando: 81 x 53 cm
fulgopatina kovraĵo
surkornaj strioj kun trianguloj
*Banfora* / Burkino
kolektojaro 1978





**Masko n-ro 4**
grando: 91 x 49 cm
surkornaj koloroj (ruĝa/blanka/blua)
densa ornamo
*Voinjama* /norda Liberio
kolektojaro 1982

**La forto de bubalo**

Ne la masko mem estas efika, sed la spirito loĝanta en ĝi. La mendinto de masko postulas de la skulptisto, ke ĝi estu taŭga por determinita spirito. Por tio ĝi devos esti simila al "elprovitaj" antaŭaj maskoj. La skulptisto do havas nur malgrandan formon donantan liberon. Li tute ne interesiĝas pri eksperimentoj kaj certe agas laŭ modelo, laŭ prototipo, laŭ fidinda tipo-specimeno, kiun li prenas kiel imitendan ekzemplon.

En tiaj limoj la artisto provos, plejeble konvinke figuri la maskon. Tiu faro dependas precipe de la karaktero de la spirita supernaturaĵo. Ĉe bubalomaskoj oni rajtas eliri de la premiso, ke ĝi devas peri animalan forton. Ni poste observu, kiel la skulptistoj atingas tiun celon.

**Simbolo kaj rito**

Maskoj ne nur esprimas religian respekton kaj adoradon al iu diaĵo. Afrikajn maskojn oni pli bone komprenas ne perdante el la okuloj, ke temas antaŭ ĉio pri simbolo. **Simbolo** estas rimedo per kiu mesaĝo, sciigo aŭ informo estas efike transsendata al la nekonscia parto de la psiko. Simboloj estas efikaj, ĉar la "lingvo de la nekonscio" konsistas el bildoj kaj simboloj. Same influas la homan nekonsciecon la **ritoj** pro la en ili entenataj mesaĝoj, speciale kiam ili estas emocie ŝarĝataj kaj efektivigitaj per solena ceremonio (ekz. maskodancado). Simboloj kaj ritoj estas kapablaj, profunde impresi la homan nekonscion per pozitivaj informoj kaj per tio egaligi eventualan negativan staton, fizikan aŭ spiritan.

La nekonscio de la homo estas simpla, eĉ infaneca. Konforme al tio estas selektataj simplaj simboloj por 'spirita' triba komunikado. La fruaj Eŭropanoj miskomprenis la simplecon de figuroj, maskoj kaj aliaj kultaĵoj de la Afrikanoj.

Ankaŭ la hodiaŭa Okcidenta Mondo ĝenerale alrigardas Afrikan arton fremda, nekomprenebla, primitiva, staranta sur malalta ŝtupo de evoluo. Nia kontribuo al *Scienca Revuo* intencas, veki iom da kompreno por fremdaj landoj kaj fremdaj moroj, kaj malfermi la okulojn de la leganto por ekkono de 'simpla beleco'.

**Karakterizoj de la maskoj**

La kvar maskoj estas skulptitaj el po unu arbtrunka tranĉaĵo kaj surpentritaj kun la koloroj ruĝa, nigra kaj blanka. Du maskoj devenas el 'maskejoj', t.e. maskotombejoj en kiujn oni metis, kvazaŭ 'enterigis' la eluzitajn maskojn, t.e. tiuj, kiuj jam "dancis". Je tiaj maskoj oni ne refreŝigis la farbojn kaj sur la maskoj formiĝis malhela, nature fulgopatina kovraĵo pro efloreska efiko de la tero. Dominas la potencaj bubalaj kornoj. La unuopa



korno ne devenas aŭ "kreskas" el krania radiko, sed la du kornoj estas seninterrompe kunligitaj unu al la alia, estigante unuecan formon sen aludo al frunta elstaraĵo. Tiu kornara strukturo sendube estas aldona kaj aŭtonoma elemento, intence metita antaŭ la kranion. La volumeca rondformo malllarĝiĝas laŭlonge de la kornoj en preciza simetrio, kaj ne finiĝas per du kornopintoj sed abrupte forrompiĝas, kvazaŭ dehakita. Pro tio la masa kompakteco de la kornoj konserviĝas kiel cirklo. Je la fino de la korno troviĝas fortranĉita bendstrio, ĉirkaŭ tri fingrojn larĝa.

Malantaŭ la kornaro estas la bele volbiĝinta osta sternaĵo de la kaloto. La duonskulptitajn orelojn oni nur vidas dum alrigardo de la flanko. Sur la frunta konveksaĵo troviĝas la okulparo, skulptita kiel rondaj elstaraĵoj sur dikaj ringoj.

Nete apartigite forŝoviĝas la muzelo. Pro triangula transversa sekcaĵo estiĝas akra meza eĝo, kiu akcentas la vertikalon. La kresteca surfaco de la muzelo forte kontraŭas al la rondaj formoj de la postrestinta masko. La tri partoj de la masko, nome kornoj, kranio kaj muzelo ne formas organikan, unu en alian transigantan unuecon. Ĉiu parto havas esprimplenan propran formon, kaj ĉiu parto estas dividita de la aliaj per ekkonebla kaj preciza dislimigo.

**Kiel distingiĝas la maskoj ?**

Por plifaciligi la distingadon de la karakterizaj kriterioj kaj signoj, ni numeradis la maskojn kaj citos ilin en la teksto laŭnumere.

Formo de la kornoj: Ĉe (1) la cirkloformaj kornoj estas iom kunpremitaj de supre al malsupre kaj pro tio la kornaro efikas peza kaj masa. La kompakteco de la fruntoparto malpliiĝas nur en la ekstera amplekso. En la kazo de (2) kaj (3) la fruntparto ne estas tiom esprimplene formita; la internaj kaj eksteraj konturoj proksimiĝas al du cirkloj, iom ŝovitaj unu kontraŭ la alia.

Tio rezultigas elegantan efekton. Ĉe (4) la rondformo estas premita al vertikala ovalo. La kornoj malgajnas laŭforte kaj laŭpeze. Sed pro tio eblas, skulpti el mallarĝa arbotrunko sufiĉe grandan maskon.

La proporcio inter kornoj kaj kranio estas plej diversa. Ĉe (1) la kranio efikas relative mallarĝa sub spacoplena kornaro, ĉe (2), la plej malgranda de la kvar maskoj, la kranio estas pli dominanta. La butonecaj okuloj estas reliefitaj per kolore apartigitaj koncentraj elstaraĵoj. Ĉe (4) estas aldonita plua, eĉ cirkle farbita elstaraĵo, tamen sen plilaltigi la intensecon de la okula rigardo. Tiu troo fakte similas al 'rigardo per surprizitaj gap-okuloj'. Estas rimarkinde, ke unuflanke la okuloj de (1) ĝis (4) pligrandiĝas, sed aliflanke okazas ŝrumpado de la distanco inter la okuloj. La lasta masko

(4) tial direktiĝas al grava aspekto de antaŭe, kiu dum dancigado de la masko certe atingos malpli da efikeco ol ties karakteriza profilo.

### Geometriaj elementoj

La dezajna skulptado mem konsistas el malprofundaj reliefigaj ornamadoj perkolore disigitaj. Sur la kornaro de (1) aperas granda, blanke pentrita kuŝanta duonluno kaj du cirkloj, kvazaŭ buŝo kaj okuloj de dua vizaĝo. Tiuj elementoj havas fortan simbolan karakteron, kaj la ĝenerala impeto de rondformo pli intensiĝas ol malaltiĝas. La duonluno aperas ankaŭ en la aliaj specimenoj. Ĉe (4) ĝi estas nur malgranda kaj premita inter aliaj ornamaĵoj, verŝajne perdinta sian originan signifon. Ankaŭ la surkornaj "okuloj" glitis tiom malsupren, ke ili estas preskaŭ ne plu projektiva al vizaĝesprima rilato.

Ĉe (2) aldoniĝas al la okulparo ankoraŭ du encirkligitaj seppintaj steloj, kies signifo al ni estas nekonata. De speciala intereso estas (3): oni rezignis pri la okulmotivo kaj uzis triangulan dezajnformon, fakte tre ŝatatan ĉe Bvaulaj maskoj. Tiu dezajno ĉirkaŭas en strioj la kornon: je la dika komenco trifoje, kaj poste sin elegante konformiĝante al mallarĝiĝo per dufoja kaj - tute supre - per nur unufoja ĉirkaŭstriado. Tio rezultigas logikan kaj konsekvencan solvon, plenan de ĉarmo.

Ĉe (4) denove troviĝas ĉiuj tiuj elementoj, kaj aperas aldone la motivo de laŭlongaj strioj. Oni povas konkludi, ke la skulptisto ne plu volis peri simbolan enhavon. Li verŝajne uzis la originajn simbolojn kiel nurajn ornamaĵojn. Pro tio estiĝis neorganika diverseco de malgrandpecaj ornamelementoj, kiuj rompas la grandan cirkloformon, forprenas plastikan spacan efikon kaj degradas ĝin al nur dekorative troŝarĝita surfaco. Estas tio, kio nomiĝas en la Eŭropa pentroarto kaj kulturo *"horror vacui"*, nome kiam ĉiuj facoj estas plenigitaj, sen neceso kaj sen bezono.

Ankaŭ la kranio kaj muzelo klare diferenciĝas ĉe la kvar maskoj. Ĉe (1) la krania konveksaĵo restas tute libera, kaj por la muzelaj surfacoj sufiĉas simbolaj diagonaloj. Ĉe (2) largaj bendoj firme fiksas la okulojn sur la krania kaloto kaj ĵetas novajn akcentojn al la maska tutaĵo. Densa ornamdezajno de zigzagaj strioj kovras frunton kaj muzelon de la tria masko, sen akcenti iujn partojn. Ĉe la kvara masko verdire nur la muzelo estas kovrita per krude skulptitaj strioj. Komparate,(3) kun (4) montriĝas granda dekliva niveldiferenco laŭ konscienca kaj metia zorgemo fare de la skulptistoj.

### Kiu masko estas la plej aĝa ?

Dum ekzakta alrigardado oni trovas mirige multajn signojn, kiuj apogas laŭstilan evoluon - nome tiu de fortoplena kaj larĝskale elpensita formo ĝis



plaĉa malgrandpeca ornama dekoracio. Tie montriĝas la proporcioj kaj geometriaj ornamaĵoj kadre de la unuopaj maskoformoj. Masko (1) tial verŝajne plej grandaparte devoligas sin al originala tipo. La maskoj (2) kaj (3) formas interan ŝtupon kun memstaraj kaj harmoniaj rezultoj. Masko (3) elegantas pro la uzado de triangulaj bendoj.

Membro de la Bva-tribo certe prijuĝus tiujn maskojn laŭ tute aliaj kriterioj. Li ekzemple povus diri, en kiu masko troviĝas la plej potenca spirito, aŭ kiun maskon elektus iuspeca spirito kiel firman sidejon kaj agadlokon. Eble li venus al simila rezulto kiel ni kun niaj formkritikaj kaj estetikaj pesiloj kaj mezuriloj. Povus ankaŭ esti, ke li prijuĝos la kvaliton de laboro kaj lerteco de la unuopaj lignoskulptistoj same kiel ni.

Lasu nin trejni niajn okulojn, kaj ni alrigarde observu estonte Afrikajn maskojn pli detale. Nu, juĝema leganto, de kiu el la kvar bubalomaskoj v i estas pleje impresita?


### Resumo

Maskoj kaj maskodancado ludas gravan rolon en la kulturo kaj en la socia-spirita vivo de Afrikanoj. La Bvauloj en Burkinofaso, Okcidentafriko, estas speciale konataj kiel lertaj skulptistoj de diversspecaj maskoj. La artikolo priskribas kaj komparas ensemblon de kvar bubalomaskoj el vidpunkto de neafrika observanto. La aludo pri simboloj kaj ritoj kaj ties signifo por la Afrika religia vivo tamen instruas la leganton, ke li dum rigardo al kultobjekto des pli multe profitos, ju pli li sin detenas de kritiko kaj senpripensa rapidtaksado. Konscia reteno de frua prijuĝo dum alrigardo de maskoj ebligas, ke la subkonscio de leganto partoprenos je la spirita influo, kiun simpla tribano spertas dum dancado de bubala masko.



### Aŭtoraj adresoj:

*Herbert* W*ELLHÖFER*
*Mergentheimer Strasse 164a*
*DE - 97084 - Würzburg-Heidigsfeld*
GERMANIO

*Prof. Dr. Rüdiger* S*ACHS*
*p/a Esperanto-Kasteleto*
*Piazza G. Marconi 2*
*IT 61020 Tavoleto (PU)*
ITALIO


### Priaŭtoraj informoj

*Herbert Wellhöfer* studis arthistorion ĉe la universitato de *Würzburg*, Germanio. Li desegnas kaj ŝatas artgrafikaĵon kaj artan figuraĵon. Post du vizitoj en Liberio li specife interesiĝis pri Afrikaj kultobjektoj, kaj direktis la kolektadon de la kunaŭtoro al pli arta selektado de ties kolekto de Afrikaĵoj. Profesoro *Sachs* estis direktoro de edukcentro por lukto kontraŭ la malsanon-portanta cecea muŝo en la tiama Supravoltio, nuna Burkino, kaj poste laboris pli ol dek jarojn en Liberio. Dum oftaj ekspedicioj en la praarbaran sovaĝejon li intime konatiĝis kun Afrika kulturo.